= Rilatoj kun eksterlando. Kelkaj -sed malmultaj- federacioj ĉeestis la U.K^on en VANKUVERO (Kanado) kaj la I.J.K^on en SWANWICK (Britio). Aliaj renkontiĝoj allogis: semajnfinaj staĝoj en HOMBURG (RFA), pedagogia seminario en KONSTANZ, staĝo en MESNIL-St-PERE, SAT-Kongreso en BORDEAUX, I.J.R^o en VILLANDRAUT, familia renkontiĝo en Italio. La strasburga grupo organizis, kadre de la ferisemajno de T.A.N.E.F. (Turista Asocio de la Naturamikoj, Esperanto-Fako), sukcesan surstratan animadon (malgraŭ malbela vetero). FR3-Alsace menciis la rolon de esperanto en la naturamika movado.

La Internacia Karnavalo en BAR-le-DUC daŭre sukcesas: 40 partoprenintoj(50). Okulfrapa ĉaro kun giganta feino... filmita laŭ "video-sistemo".

Pluraj grupoj montriĝis okaze de ekspozicioj: aparte menciindas la sukcesa "Renkontiĝo de la Asocioj" en MONTIGNY-lès-METZ.

Grupoj akceptis ankaŭ eksterlandanojn: ĉi-tie ni devas gratuli la grupon de BAR-le-DUC, kiu akceptis hungaran vojaĝpreleganton dum pluraj tagoj.

KONKLUDO

Se, tiun jaron, la informado iom pliboniĝis, ni tamen povas bedaŭri la malbonan funkciadon de pluraj lokaj grupoj. Ĉu ili "kunvenis vane"? Verŝajne jes... kaj tio certe pliboniĝos. Ke ĉiu grupo laboru por preciza temo, ke ĉiu samideano proponu program-eron kaj efike kunlaboru: tio devus esti la baza tasko de ĉiu esperantisto. Kaj ne forgesu la plej gravan...: NEPRE MALKOVRU NOVAN LERNANTON KAJ NOVAN ESPERANTISTON!

NOTINDA DATO...

POR NACIA EVENTO

PENTEKOSTE 1986

EN NIA REGIONO...

Gérardmer

"la perlo de l'VOGEZOJ"



LANDA

KONGRESO

DE U.F.E.

UNUIĜO

FRANCA

POR ESPERANTO

NIAJ DONACINTOJ

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizojaro 1984:

Sr° Bertrand DENIS 18F - Sr° CROCHET 62F - Sr° FUCHS 30,83 F - Fin° HOUILLON 50F -
 Sr° CUENE 73F - Sin° ORY 178F - Sr° RADAM 20F - Sr° BERGEROT 500F - Anonima 80F -
 Ges°j SCHEFFER/PELLIER-MERMIN (pro edziĝo) 179,95F - Sin° SCHEIDEL 38F -

Sume: 1229,78 F

Subvencio kaj donaco por eldono de "LA INFORMILO": E°-Klubo de METZ 500F -
 Sr° BLESSING 118F

Sume: 618F

FINANCA RAPORTO PRI LA JARO 1984

<u>ENSPEZOJ</u>		<u>ELSPEZOJ</u>	
Kotizoj		Afrankoj kaj sekretariaĵoj	720 F
= 100 federaciaj membroj	1604 F	Leter-papero de UFE	854,50
= 68 UFE-membroj	991	Pruntedono al la libro-servo	2000
Donacoj	1229,78	Propagando	402,51
Profito de la staĝo (Villers)	440,50	Aĉeto de materialo	59
Rentumo+respond-kuponoj	818,07	Aĉeto de lotumotaj donacoj	
Vendo de materialo	89	dum la federacia kongreso	471,60
	<u>5172,35</u>		<u>4507,61</u>

ELDONADO DE "LA INFORMILO" EN 1984

<u>ENSPEZOJ</u>		<u>ELSPEZOJ</u>	
251 abonoj	5629,60	Eldonado n° 45 (430 ekz.)	2140,40
Subvencio kaj donaco	618	46 (350)	1296,50
Repago fakturo	248	47 (400)	1610
		48 (420)	2858,42
		Send-kostoj enlandaj	513,61
		eksterlandaj	367,75
		Materialo diversa	318
		Banderoloj	155
		Diversaj afrankoj	196
	<u>6495,60</u>		<u>9455,68</u>

BILANCO

		<u>REZULTO</u>	
Enspezoj Federacio	5172,35	En la kaso je la 31/12/83	6621,08
Elspezoj Federacio	- 4507,61	Profito Federacio	+ 674,74
Profito Federacio	664,74	Deficito "INFORMILO"	- 2960,08
Elspezoj "INFORMILO"	9455,68	<u>En la kaso je la 31/12/84</u>	<u>4326,74</u>
Enspezoj "INFORMILO"	<u>6495,60</u>		
Deficito "INFCRMILO"	2960,08		

HAVO DE LA FEDERACIO JE LA 31/12/84

Dank' al niaj malavaraj donacintoj kaj subvenciiintoj ni povis fari pruntedonon al la libro-servo. Sed la eldonado de LA INFORMILO restas kronike deficitita. Solvo estas trovenda.	En la kaso	4 325,74
	Stoko de la libro-servo	75 352
	P-Ĉ-K° de la libro-servo	734,70
	Ŝuldoj	- 2 608,02
		<u>77 804,42 F</u>

FINANCA RAPORTO DE LA LIBRO-SERVO POR LA JARO 1984

ENSPEZOJ

Vendo de libroj	9440,40 F
de diskoj, kasedoj	1220
de diversaj E°-aĵoj	620
Repago de afranko	129
Pruntedono de la Federacio	2000
Alia prunedono	1000
Donacoj, uzado de pasintaj kreditoj de eldonistoj	889,90
	<hr/>
	15299,30

ELSPEZOJ

Aĉeto de libroj	12107,90 F
de diskoj, kasedoj	1168,60
Dogankostoj, ŝanĝ-kontrol-kostoj	189,80
Diversaj kostoj	98,30
Prunte-redono	1000
	<hr/>
	14564,60

En kaso en P.Ĉ.K°
je la 31/12/84 _____

734,70

HAVO DE LA LIBRO-SERVO

	<hr/>	26/6/84
Libroj	58619 F	
Poŝtkartoj	2375	
Disko, kasedoj	1130	
Insignoj	915	
Kredito ĉe S.A.T.	672,50	
Suldoj al la libro-servo	620,50	
Poŝt-ĉek-konto	-	
	<hr/>	64332
Pagotaĵoj de la Libro-servo	- 4513,28	
Suldo al la federacio	-	
	<hr/>	59818,72

31/12/84

68784 F *	
2300	
2195	
525	
-	
1548	
<hr/>	734,70
76086,70	
2608,02	
<hr/>	2000
71478,68	

* laŭ la katalogo
de UEA. 34/85,
1 guldeno = 2,70 FF

REZULTO

Havo je la 26/6/1984	59 818,72
Profito	11 659,96
	<hr/>
Havo je la 31/12/1984	71 478,68



karaj legantoj de LA INFORMILO,
jam de nun, antaŭmendu unu
(aŭ du!) ekzemplero(j)n de miaj
aventuroj ĉe nia libro-servo,
al kiu mi petas vin resti daŭre
fidelaj!!

Bonvolu antaŭmendi -pagante 32,50 FF por unu- ĉe nia libroservo,
kiu jam rezervis sufiĉan kvanton!

ĉu vere ili aŭdos
tjun amikan
admonon?...



...JES JA!....
NOVA TINĈJO APEROS
EN SEPTEMBRO 1985!

"LA SEKRETO
DE L'UNUKORNULO"

LIBRO-SERVO M.J.C.
BP 23
54510 TOMBLAINE

P.Ĉ.K° (Poŝt-Gir-Konto):
2800-76 H NANCY

NIA VIVO EN...

THIONVILLE

En la ekspoziciejo de la urba biblioteko okazis ekspozicio pri esperanto. La urba biblioteko prizorgis la ĝeneralan informadon, faris la afiŝojn kaj gluis ilin tra la urbo. La montrita materialo estis la ekspozicio preparita de P. DENIS, kun aldonitaj libroj, en esperanto, pri esperanto, pri interlingvistiko ĝenerale (libroj pruntitaj, ĉu de la lokaj esperantistoj, ĉu de la biblioteko mem, ĉu de la biblioteko de la Liceo Charlemagne, kiu estis la oficiala organizanto). Florpotoj, afiŝoj, komfortaj seĝoj, muziko kreis taŭgan etoson por la vizitantoj. Krom tri klasoj, venis kelkaj dudekoj da vizitantoj ĉiutage; plej ofte jam interesitaj homoj - ĉu aŭskultintoj de la pasintjara elsendo, ĉu fervojistoj, ĉu bibliotekistoj-, kiuj faris longajn demandojn. Tabulo permesis doni klarigojn; funkciis libroservo, kie oni vendis la franclingvan materialon ("verdaj broŝuroj", Prestiĝan broŝuron, Metodon 23, banderolojn, Culture et Espéranto) eldonitan de UFE.

La honorvinon honoris tri reprezentantoj de la urbestro kaj deko da aliaj kulturaj asocioj. Marde okazis prelego far Stefan Mac Gill (Nov-Zelando el Rotterdamo) pri Nov-Zelando kaj Japanio, du malsimilaj insuloj, en esperanto kaj franclingva interpretado. La postan lundon, Claude NOURMONT kaj Renée TRIOLLE estis intervjuitaj ĉe Radio-Beffroi, kadre de la elsendo de Kultura Centro de Thionville.

Renée TRIOLLE

*

SELESTAT

De januaro 1985, 33 gelernantoj de la 2a-klaso lernas esperanton en la liceo. Tamen dum la unua trimestro de la lernojaro, Sinjoro GUEGUENIAT, ilia profesoro, psikologie preparis la terenon, el kio rezultis entuziasma lernado. Espereble nova sango por la federacia junularo!

Edmond LUDWIG

*

NANCY

La kursoj plu funkcias, kvankam iom lame en januaro pro la neĝo kaj la malvarma vetero. La kunvenoj okazis la 11an de januaro kun 10 partoprenintoj kaj la 8an de februaro kun nur 3 personoj. Ci-lastaj estis la plej laborplena kunveno, ĉar ni translokiĝis nian bibliotekon en nian novan kursejon. Ni kunvenos denove la 8an de marto kaj alvokas al helpantoj por reordigi nian libraron.

PRI NIA PERKORESPONDA KURSO...

Feliĉe(!) la nuna vintro estis tre neĝa kaj malvarma. Tial la publiko -relative- pli entuziasme respondis al la komunikoj aperintaj en la gazetaro en januaro. Ĝis la fino de decembro, en 4 monatoj, mi dissendis 35 komunikojn al nia regiona gazetaro. Almenaŭ 30 el ili aperis, 47 personoj petis informojn, 8 aliĝis al la PK°. En januaro mi sendis 11 pliajn komunikojn, 9 aperis, venis 43 informpetoj kaj aliĝis 13 pliaj gelernantoj. Sed ek de februaro, malgraŭ 11 pliaj komunikoj, leteroj preskaŭ tute ĉesis alveni...

Nur 1 lernanto ĝis nun finlernis "M11" (en malpli ol 2 monatoj): Sr° Etienne BARRIER, 68720 HOCHSTATT, gvidata de S-r° GROSSMANN. Li korespondas kaj tuj aliĝis al "M12".

PRI LA KOTIZOJ DE LA PK° - Ni memorigas, ke la kotizo al la kurso (per M11) kostas 138 F, sed atentu, ke la prezo de la kasedo altiĝis, nun 50 F. La kompleta kotizo estas do nun 188 F. La lernantoj, kiuj finlernas M11 en malpli ol 5 monatoj, povas lerni per M12 ne pagante plian kotizon: la libro sola, sendita registrite, kostas 48 F. Tiuj, kiuj bezonas pli longan periodon devas krome pagi novan kotizon -kun aliĝo al la federacio kaj abono al LA INFORMILO por la sekvanta jaro- je 85 F (do 48 + 85 = 133 F). La kasedo por M12 kostas 58 F (plus eventuale sendkostoj).

KUNLABORANTOJ DE NIA PK° - 15 homoj kunlaboras: Sr°j DENIS, GROSSMANN, ETIENNE, DEGRELLE, GREINER, LUDWIG, GUEGUENIAT, VIVIER, GUILLAUME, WICK, THIBIAS, CROCHET... F-in° ROUX, S-in° BUSSEY. Sukcesis krome aperigi komunikojn S-in° NAU en MONTIGNY-lès-METZ, S-r° CROCHET en EPERNAY, S-r° REMY en LUXEUIL. Varbis kelkajn lernantojn per sia propra agado ligita al apero de komunikoj, S-r° GROSSMANN apud MULHOUSE, S-r° CROCHET kaj S-r° REMY.

LES JOURNAUX ET NOUS

Depuis octobre et pendant toute la mauvaise saison, nous adressons régulièrement, une fois par mois un communiqué à chacun des 11 journaux régionaux avec lesquels nous sommes en relation. Parmi ceux qui nous aident le plus, citons LES AFFICHES DE LA HAUTE-SAONE (le même communiqué paraît parfois plusieurs fois), LES AFFICHES MONITEUR D'ALSACE ET DE LORRAINE -journal qui insère TOUS nos communiqués... et nous adresse chaque fois un exemplaire-L'UNION (Reims) qui a totalisé 6 insertions pour 4 com. envoyés et a fait paraître une grande interview de M. CROCHET, L'EST REPUBLICAIN (Nancy) qui totalise également 6 insertions mais avec nécessité de remettre les textes à la rédaction; nous les remercions bien sincèrement pour l'aide qu'ils nous apportent -gratuitement, soulignons-le!-.

Parmi les autres, citons L'ALSACE (7 com. mais parfois extrêmement condensés), LES DERNIERES NOUVELLES D'ALSACE (4 com. ... parfois résumés en 2 lignes ce qui les rend inutiles), LE REPUBLICAIN LORRAIN (Metz), grâce à Mme NAU, a inséré 3 com., mais péniblement car plusieurs visites sont nécessaires pour chacun!

Qui pourrait me transmettre régulièrement ceux paraissant dans LA LIBERTE DE L'EST (Epinal), LA HAUTE-MARNE LIBEREE (Chaumont) et LE NOUVEL ALSACIEN?... ainsi que les articles touchant aux problèmes des langues? D'avance merci!

Jean-Paul COLNOT

*

REPRESENTA KOMUNIKO

NOVA FAK-GRUPO NASKIGIS EN U.E.A.

Pri komerco tra tutmondo, kelkaj naciaj delegitoj kuniĝis por krei fakgrupon, kies formala fondkunveno okazos dum la 70a UNIVERSALA KONGRESO en AUGSBOURG. Nuntempe, 16 membroj el 14 landoj partoprenas la agadojn de tiu fako. En Francio... nur unu! Ne sufiĉas! Mi deziras, ke kelkaj aliaj Francoj interesiĝu al ĝi, ĉar estas grava afero.

Mi estas preta sendi senpage al ĉiuj interesatoj la fotokopion de la tri unuaj "novaĵleteroj", letero, kiu estas la oficiala informilo de la komerca fakgrupo.

Demandu ĝin al S-r° François-Xavier GILBERT, Vert Coteau, LONGEVILLE-en-BARROIS, F-55000 BAR-le-DUC

*

psstt!... momenton ni petas!

Se vi jam pagis vian kotizon por ĉi-jaro, vi trovos en ĉi-tiu n° kelkajn aldonitajn glu-markojn. NOVAJ U.F.E.-membroj aparte ricevas la membro-kartojn.

- 1/ Jarmarko por ĉiuj niaj membroj (federaciaj kaj aliaj). Vi gluu ĝin dorso de via federacia Membro-karto. (Tiucele vi forigu la sub-paperecon. La marko estas memgluebla).
- 2/ Jarmarko por la U.F.E.-membroj; ĝi estas rozkolora por la simplaj membroj, kaj blua por la individuaj membroj. Vi gluu ĝin sur via U.F.E.-membro-karto.
- 3/ La membro-marko-folio de U.E.A. konsistas el = membro-markoj uzendaj por rilati kun UEA-delegitoj; tiuj m.m. atestas vian membrecon (peco gluenda sur ĉiu pet-letero al iu ajn delegito, kies nomo kuŝas en la "JARLIBRO").
= La jarmarko por la UEA-membroj. Vi eltondu ĝin kaj surgluu sur via UEA-membro-karto.

Se vi ne ankoraŭ pagis vian kotizon aŭ vian abonon, vi malkovros en ĉi-tiu bulteno novan kotiztabelon kaj memorigilon, per kiu vi povas informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidon kaj urĝe pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu n° de LA INFORMILO estas la lasta sendita al vi ne renovigas vian abonon.



Se via pago interkruĝis kun la sendo de tiu-ĉi INFORMILO, tiam intertempe via abono ordiĝis kaj la kunsendita alvokilo ne plu koncernas vin!

Oriendifranca
Eo-Federacio
1985

UFE 1985

U E U
E E E
A A A

AL NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ

En la antaŭa n° de LA INFORMILO (n° 48) aperis granda kotiz-tabelo, "bedaŭrinde" franclingve, pri la kotizoj kaj abonoj por 1985. Tial ni deziras aparte informi al vi, ke la abono al LA INFORMILO por 1985 estas 36 FF aŭ 12 internaciaj kuponoj ('respond-kuponoj' aĉeteblaj ĉe ĉiu Poŝt-Oficejo).

Se vi ne jam pagis vian abonon por la nova jaro, bonvolu fari tion sen prokrasto.


Vi povas pagi per simpla poŝta ĝiro al nia Poŝt-Ĉek-Konto: FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO = PCK° 1997-72 W NANCY aŭ per sendo de 12 I.R.K-oj al nia kasisto: S-r° André GROSSMANN, 5, Rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM.

Krome ni deziras informi vin, ke ĉi-tiu n° (49.) estas la lasta sendita al vi, se vi kiel eble plej frue ne renovigos vian abonon.

Se vi jam pagis vian abonon, tion vi povas kontroli jene: kiam supre de via adreso sur la banderolo troviĝas kod-numero, kiu komencas per 5 (ekz. 5A63), tiam vi povas esti certa, ke via abono por 1985 estas pagita.

La kasisto, A. GROSSMANN

Al niaj membroj, kiuj loĝas ekster la federacia teritorio, do ekster la departementoj 54,55, 57,67,68 88, ni deziras atentigi pri la jeno: per via eventuala aliĝo al U.F.E. vi ne plu membriĝas en nia Federacio, ĉar la komputoro de UFE estas tiel programita, ke nur UFE-anoj de la 6 supre menciitaj departementoj iĝas anoj de nia Federacio. Tial bonvolu aparte pagi la federacian kotizon je 18F por resti aŭ iĝi membro en nia Federacio.



En la "UNIVERSITE POPULAIRE de MULHOUSE" daŭre funkcias la E^o-kurso por komencantoj. Ĝin regule sekvas 6 gelernantoj el la 9 enskribitaj. Estas nun uzata la "METODO 12" kun gvidado de S-r^o GROSSMANN.

La loka radio-stacio "RADIO-VISAGE" (101,6 MGZ) daŭre disaŭdigas E^o-programon ĉiun vendredon vespere de la 17a30 ĝis la 19a. La programo estas dividita en 3 partoj. Unue estas informoj en la franca lingvo pri E^o, due oni povas aŭdi E^o-kurson registrita fare de UFE; trie por la Esperantistoj kaj por la lernantoj okazas la esperant-lingva rubriko kun informoj, dialogoj, kantoj, ktp.

Se vi havas materialon, kasedojn kun informoj en E^o aŭ en la franca, taŭgaj por radio-programo, bonvolu ilin proponi al A. GROSSMANN, 5, Rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, kiu prizorgas ĉi-tiun programon ĉe "Radio-Visage".

A. Grossmann

ESPERANTO-TURISMO

Nia Orienta Federacio ekhavis kontaktojn kun turisma kompanio en Turkio, "MATUR TURIZM" kiu havas Esperant-lingvajn servojn. Tial ni povas proponi al vi vojaĝon kaj feriadon en tiu lando kun gvidado en Esperanto fare de Esperant-lingvaj deĵorantoj de MATUR TURIZM.

Jen programo:

Flugado iro kaj reveno de aero-haveno MULHOUSE al ISTANBULO 1200 FF
(forflugo dimanĉe, reveno sabate) (por unu persono)

Kodo Priskribo

FUB-T Por unu semajna restado, plen-pensiono en ne-turistaj hoteloj kaj restoracioj, transporto ne publikaj veturiloj, por unu persono

1200 FF

TURS-T Por unu semajna restado, plen-pensiono en turistaj hoteloj kaj restoracioj, transporto ekster la hoteloj per novaj speciale luitaj omnibusoj, kun altnivelaj kategorioj kaj servoj, por unu persono

2400 FF

represenda anonco
en ĉiu-ajn E^o-gazeto

Ankaŭ estas ebleco restadi unu semajnon ĉe la marbordo.

Por ricevi pliajn informojn kaj por rezervi, bonvolu skribi al

— S-in^o Corinne CHARTON, 14, Rue Henri MATISSE, 68200 MULHOUSE



"LA MIGRANTO" estas trimonata, riĉe ilustrita Esperanto-revuo pri turismo, vojaĝoj, feriado, naturo, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj. Ĝi estas eldonata de T.A.N.E.F., t.e. Esperanto-Fako de la internacia (ne-esperantista) Natur-amika Movado. Ĝi kostas jare (4 numeroj) 7,00 svisajn frankojn.

Petu senpagan provekzempleron de: Liesel NAGEL, Roseggerstr. 17,
D-7800 FREIBURG, F.R. Germanio

"Laŭ la fluo de l' interparolo" Konversacia gvidlibro Franca-Esperanta 88 paĝoj


"... Fervora kompilemo trafis ne nur amikon LENTAIGNE, sed nakaŭ lucien BOURGOIS, kiu, post sia laŭdinda kaj ja laŭdita "PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA"... entreprenis arigi alfabet-vice tipe francajn, foje slangajn, frazerojn aŭ frazturnojn por liveri al ĉiuj -tiel al la babil emuloj kiel al la tradukemuloj-! Li tiel ŝparigas an ni ĉiuj multe da ŝvito, kaj ankaŭ multajn erarojn..."

Tiu poŝlibreto, tute oportuna, estas valora komplemento de "TIEL DIRU" kaj reciproke! Mendu senprokraste, kaj preferinde por via tuta E^o-grupanaro, ĉar la eldonkvanto estas limigita ..."

(aperinta recenzo en "LAUTE")

Prezo: 6 FF (10 FF poŝte) pagotaj al PĈK^o LILLE 1165-87 V, laŭ la nomo de "Madame BOURGOIS" Lucien BOURGOIS, 25, Rue Gambetta, F-62950 NOYELLES GODAULT

karaj junaj geamikoj



"En tiu internacia jaro de la Junularo, ni petas vin fruktigi plej intense viajn konojn en Esperanto.

Tiucele vi nepre kontaktu perlete-re geamikojn ie ajn kaj vi partoprenu specifajn aranĝojn, kiuj okazas dum la tuta jaro pli malpli proksime de vi.

Tiu regiona malofta bulteno ne kapablas informe vin grand-skale kaj ĝustatempe... Tial, kiel multaj Francoj junaj, vi aliĝu ala la nacia sekcio J.E.F.O. de la tutmonda porjunulara organizado, T.E.J.O.

Tiamaniere vi ricevos regule plej bonajn informojn pere de diversaj dokumentoj. Eksciu, ke laŭ via temperamento vi sukcesos travivi neforgeseblajn eventojn dank' al Esperanto. La programo de la jaro 1985 svarmas je riĉaj multifacetaj aranĝoj.

Estus bone se vi jam de nun sendus vian kotizon laŭ la tabelo (francilingva) trovebla en ĉi-tiu n^o. Bone atentu la piednoton "D".

Ne forgesu ankaŭ, ke tiu paĝo apartenas al vi. Vi kunlaboru sendante raportojn, sugestojn, personajn spertojn... sed ankaŭ humuraĵojn aŭ klerigaĵojn!

Plej amikan saluton al vi ĉiuj!



ESPERANTO EN FILATELIA EKSPOZICIO

Sabaton kaj dimanĉon (24an de februaro) okazis la jara ekspozicio de la Filatela Societo de COLMAR. Inter la 500 prezentitaj folioj, oni povis vidi 24 foliojn kun 26 poŝtmarkoj kaj 88 poŝt-stampoj el 25 landoj... pri la temo ESPERANTO. Tri paĝoj estis dediĉitaj al la esperantista movado per specialaj porokazaj stampoj de TEJO-Kongresoj, Junularaj Festivaloj, ktp., por atentigi la junularon pri ESPERANTO kaj pri la INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO 1985. Dum la inaŭguro, la urbestro de COLMAR kaj la Ĉef-konsilanto - "Président du Conseil Général" - de la departemento HAUT-RHIN donacis al mi memorigan medalon.

Vizitis la ekspozicion pli ol 800 personoj.

Ĉi-sube, speciala Esperanto-stampo uzita ĉe la poŝtoficejo de POZNAN (Pollando), la 15/12/63, okaze de la Jaro de la Esperantista Junularo!

Michel BASSO

membro de ELF-AREK (E^o-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj)

Internacia piedirado tra Verkor Montaro

Verkor Montaro estas la plej suda el la subalpaj ĉenoj de la Nordaj Alpoj; ĝi estas konsiderata, kiel la plej bela mezalta montaro el Francio.

La etapoj konsistas el distancoj de 15-20 kilometroj, inter 1 000 kaj 1 500 metroj de alteco. La kulmino atingas 2 341 metrojn en "Le Grand Veymont".

La akceptejo kaj interkona vespero okazos vendredon la 5an de julio en "Centre de l'Epervière", "Valence/Rhône". Sabaton matene, buso veturigos nin ĝis "Saint Laurent-en-Royans", de kie komenciĝos la piedirado dum sep etapoj ĝis "Die".

Oni dormos en tendo. Ĉiu matene post la matenmanĝo kaj disdono de malvarma tagmanĝo, individue transportata per tornistro, piedirado dum kvar horoj. Tagmanĝo kaj ripozo, sekve du horoj da marŝo ĝis la sekvanta tendumejo. Varma vespermanĝo.

Paroladoj kaj amuziĝoj, laŭ la bonvolo de la partoprenantoj. Kurso de Esperanto por komencantoj, se estas interesatoj.

Oni devas alporti ekipaĵon por ekskursi, t.e.: dormosako, marŝoŝuoj, manĝilaro kaj pluvŝirmilo. Estas konsilinde, ankaŭ alporti tendon, ĉar ĝia luo estas multekosta; tamen oni povas lui ĝin, je la prezo de cent Frankoj po persono.

Sendu la aliĝilon kaj koston antaŭ la 1a de majo, poste ĝi koston kvindek Frankojn pli, al: GABALDA - 20, rue des Jardins - 26500-Bourg lès Valence. FRANCIO. Poŝtkonto: LYON 678798 X.

Komunikas: F. Gimbert



nos cotisations 1985

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1985 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (15F), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

CAT. TABLEAU DES COTISATIONS 1985

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO
- 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST
 - * membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)
 - * membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.
 - * membre simple
 - * membre abonné "junior" (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")
 - * membre abonné "senior" (avec la revue de l'UFE)
 - * membre abonné (conjoint)
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + la revue "KONTAKTO"... si moins de 26 ans)
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + revue mondiale "ESPERANTO" + revue KONTAKTO si moins de 26 ans)

	moins de 22 ans	plus de 22 ans
	25F	25F
	18F + 25F	18F + 25F
	18F	18F
	65F + 25F	65F + 25F
	155F + 25F	
		170F + 25F
		80F
	231F + 25F	246F + 25F
	345F + 25F	360F + 25F
		360F + 25F

IMPORTANT


- A - Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et la revue trimestrielle régionale LA INFORMILO (... s'ils sont abonnés)
- B - Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1985 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C - Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (G.E.E.)... sauf catégorie 2.
- D - Les jeunes gens jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (J.F.E.O.) sauf catégorie 2. Ils recevront alors en plus la revue "KONCIZE" et le bulletin interne national "JEFO informas".



distra angelo



KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE

1 Kiel muaro - sufikso (R). 2 Por la sunsubiro - dentcetaco (R) -adverbo. 3 Ŝi ricevis Zeŭson, kiu alprenis la formon de or pluvo - moviĝi (R) - intuicio. 4 litero - manovra monero (R) - por fari polenton. 5 Arbedo (R) - ornama stilo. 6 Bulboherbo - havigi al iu helpon (R) - prilabori la kanabon (R). 7 Ĉina unco - mevo(R) - unuo de laboro. 8 Por purigi - ricevi pagante, dum tempo. 9 Kiu ĝin tuŝas, tiu sin pikas (R) - organo kiel eta fel sako. 10 Larĝa zono - laroforma birdo - bazita sur du princi poj. 11 Ruliĝanta bruo - sufikso (R) - maljuna.

VERTIKALE 1 Por pasigi la fedenon. 2 Strutosimila birdo - malsupera Ĵuraso (R) - prefikso. 3 Likeno (R) - preni por prefero. 4 Trudi - litero - pronomo. 5 Hejtaĵo - ĝi havas aerodinamikan formon (R) - rapide moviĝi (R). 6 Ehinodermo (R) - serozo. 8 Spice odora herbo (R) - ĝi estas nigra aŭ ruĝa - skipo (R). 9 Rilata al organo - alia organo (R) - infano. 10 Malnova (R) - Kveri (R). 11 Cifero - serioze labori - maldika metalo (R). 12 Reĝo en sia genro (R) - parto - artikolo.

SILABENIGMO *Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La unua kaj tria kolonoj, vertikale legataj, elformas proverbon.*

an bu de ef em en et iam ib iki iko io iso ita ko lea lo mio mio mo mo mo nc ne ne ni no no no nu nuk om ono oo or pre pro ra sa si sis so ta te to tra uz ve vio vra zo

1	+ - + - - -	diablo
2	+ - + - -	scienco pri moralo
3	+ - + - - - -	pensomalsano
4	+ - + - - -	rekompenco
5	+ - + - - - -	regiona malsano
6	+ - + - - -	koncernanta atomon
7	+ - + - -	speciala relo
8	+ - + -	rando de ŝtofo
9	+ - + - - - -	ne prenita kiel rimedon
10	+ - + - - -	religia movado
11	+ - + - - -	papa ambasadoro
12	+ - + - -	iama sankta birdo
13	+ - + - - - -	artefarita korpoparto
14	+ - + - - - - -	iama publika veturilo
15	+ - + - - -	danĝera substanco
16	+ - + - - - -	floro
17	+ - + - - - -	viskoza likvaĵo
18	+ - + - - -	agi fruktodone
19	+ - + - - -	ruino de ŝipo
20	+ - + -	je nedifinita momento

NIAJ LEGANTOJ VERKAS...

Averto: ne enŝovi en ĉiajn manojn...

La MUZO *

*Kiel infano sin gluas
Al mamu kaj mordas ĝin,
Ke riĉa lakto elfluas
De la ploranta virin',
Tiel mi mordos ĝis sango
La dolĉan karnon de vi,
Mi sentos sur mia lango
Ŝprucon de la poezi'.
Nuda kaj plena de timo,
Sed konsentanta viktimo,
Vi rektos en nobla star'
Antaŭ la ama altar'...
Kaj, dum mi fale vertiĝos,
El viaj krioj naskiĝos
Per via sindonacem'
Mia plej bela poem'.*

Anonimull(in)o

* Variantoj:

L'Amuzo...

L'Am-Uzo...

(sed... ĉu la aŭtor/in/o konsentus?..)

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (N° 48)

KRUCVORTENIGMO = kalkulmaŝino alie beata bor ludilo mamut ido rinocero sida efiko kod tein tatu celo el etruri erik fetu ekir navo korvo odor er atoni zoofit lira zoster us brom inter ido

SILABENIGMO = "Kontraŭ ĉiu tedo, ekzistas rimedo"